

Cent tagoj da laboro

ILEI elektis novan estraron ĉi-jare. Pasis cent tagoj depost la enoficigo, do indas resumi la atingojn de tiu periodo:

- Revigligo de la hejmpaĝo: pluraj novaj eroj aldonitaj ĉiusemajne.
- Komunika intensigo: regulaj mesaĝoj al sekcioj, komitatanoj kaj tra edukaj listoj
- Aktiva partopreno en la Universala Kongreso en Bialistoko; 50+ ITK-ekzamenitoj.
- Aperigo de la tria numero de IPR kun konferencaj raportoj kaj prelegoj.
- Aktiva interveno por ebligi okazigon de la instruist-trejna kurso en Poznan, Pollando
- Eldono de du komunikoj, unua bulteno kaj aliĝilo por la 43a konferenco en Kubo
- Pretigo de varbiloj por la lanĉata membrovarba kampanjo por 2010
- Partopreno kaj salutado ĉe trilanda lerneja renkontiĝo (Britio, Germanio, Hungario)
- Aktiva kontribuado al Torpedo 5 en la Esperanto-urbo Herzberg, Germanio, kun trejnkurso por polaj instruistoj (vidu la apudan foton).
- Salutado kun postsekvado al i.a. korea kongreso, konga lerneja-inaŭguro kaj brita kurso.
- Anonco de ekzamenaj sesioj jarfine en Togolando, Germanio (2) kaj Pollando.
- Aperigo kaj dissendo de la dua numero de Juna amiko.
- Sukcesa reprezentiĝo de ILEI ĉe Unekso pere de franca delegacio.



Agado en preparo:

- Aranĝo en Afriko en 2010
- Rekonstruado de sekcioj en Belgio, Britio kaj Irano.
- Trakto de Hispana aliĝpeto, klopodoj en Portugalio kaj Pakistano pri fondo.
- Preparoj por estrarkunsido en Roterdamo (Nov 26-30)
- Pretigoj por elpaŝado en la malferma tago de UEA en la Centra Oficejo.
- Starigo de instruista trejnado por latinamerikanoj kadre de la kuba konferenco
- Kaj multo pli...

La ideo pritaksi la unuajn cent tagojn de nove elektita organo ne naskiĝis ĉe ILEI. La usona gazetaro praktikas ĝin delonge. Fine de sia 100-taga debuto, prezidanto Obama ŝercis ĉe honoriga bankedo kun la vaŝintonaj ĵurnalistoj, ke “nia plenumo de la sekvaj 100 tagoj da oficado estos tiom efika, ke ni planas fini ĝin en 72 tagoj... kaj en la 73a tago ni ripozos.” Tiam oni ridis. (Li supozeble ridus malpli laŭte nun, kiam la opoziciaj fortoj densiĝis por bremsi kaj malhelpi tiujn planojn.)

Ĉiuokaze, ILEI ne ĝuas ech la dekmilonon de la rimedoj de tia potenca ŝtato. Ĉe ni okazos inverse. Ni ĝojos se la taskoj de la sekvaj cent tagoj realiĝos eĉ en 172 tagoj. Ni efektive en la unuaj cent tagoj plenumis signife malpli ol la esperoj. Tamen, ĝi reprezentas solidan ekpaŝon, kaj signalas klare novajn vojojn por la ligo, kiujn ni, precipe tra nia baldaŭa estrarkunsido, devas fortigi kaj progresigi.

En mia ĉefartikolo en la tria numero de IPR (Internacia Pedagogia Revuo) mi proklamis ke ni devas difini ne nur celojn, sed ankaŭ projektojn, plenumantojn kaj limdatojn, ĝuste kiel faras komercaj entreprenoj. Eble miaj vortoj impresis brutalaj. Tamen, mi ne pentas ilin - sed restas konvinkita ke ni devas alpreni tiajn labor-manierojn. Ĉe kompanioj kaj registaraj ministerioj la homoj submetiĝas al tiaj liverskemoj, ĉar oni pagas (kaj foje pluspagas) ilin tion fari. Ĉe ni estas esenca diferenco – en

libervolaj movadoj kiel la nia la kunlaborantoj pretas alpreni tian disciplinon, nur se ili kredas – aŭ estas konvinkeblaj –, ke tio estas la plej efika vojo transformi siajn organizojn al sukcesaj celplenumaj unuiĝoj.

Tra la lastaj jaroj ILEI enkasigis kritikojn, ke ĝi ne agadis sufiĉe, similaj kritikoj atingas nin ankoraŭ nun. Sed tutan agadon ne povas plenumi sep estraranoj, nek tridek komitatanoj. La sekcioj kaj la membroj kaj edukemuloj ĉie devas kontribui! Jen du sloganoj por pensigi vin:

- Se ne vi, kiu alia?
- La Centra Oficejo de ILEI – tio povas esti nenio alia ol vi, mi kaj ni chiuj.

Do, membroj, restu kun ni en 2010, venigu aliajn! Ne-membroj, aliĝu al ILEI, por ke kune ni konstruu tian poredukan forton kiun ni sopiras, kaj kiun la movado bezonas!

Stefan MacGill
Prezidanto, ILEI

Dissendita Nov 11, 2009.